

Kiel plu

Konkludo ? Resumo	878	3) At være "skipari"	889
'&5. Kion kompreni:..... 878		4) Feltarbejdet 2014 / 2015	890
Feroaj baladestroj rakontas.....	878	5) Før dansen: indlæringsprocessen	891
& Kiel parkerigi:.....	888	6) I dansen: at få teksten under foden.....	894
& Kiel regi:	891	7) Efter dansen: ros og kritik, personlig videreudvikling.....	897
Kiel evolui:	895	8) "god dans" / "dårlig dans"..	901
Bona aŭ malbona danco.....	898	9) Den gode danser (at have stev / at flytte benene).....	902
Iom pri takto	879	10) Færøsk dans "på scene" ...	903
'&6. Kiel verki:	880	11) Nutidens repertoire	905
'&7. Kiel tonsilabi:	883	12) Konklusion.....	907
'&6.da. Andrea Opielka:886		€Ɔ.....	908
1) Indledning.....	886		
2) Bevarelse og tradition	887		

Konkludo ? Resumo

Se ĉi tiu kolekto da baladoj populariĝos, kredeble kelkaj el la baladoj fariĝos ŝatataj kaj multe dancataj dum aliaj ne sukcesos kapti homojn. Se iam iu eldonos duan version de ĉi tiu libro, mi opinias ke tiuj ne popularaj baladojn oni sarku for kaj aldonu aliajn, el lingvoj, tradicioj kaj kulturoj kiuj ankoraŭ mankas en ĉi tiu libro. Esperinde troveblis tiam ankaŭ novaj baladoj rakontaj, verkitaj originale en esperanto por esti ĉendancataj.

'&5. Kion kompreni:

Feroaj baladestroj rakontas

1. Citaĵo

Andrea Opielka komencas per citi verkiston Jørgen-Frantz Jacobsen, kiu en sia romano "Barbara" skribis pri feroa danco:

"Jes, oni povas eĉ diri, ke la baladoj estas la esenco, dum la danco estas nur la akompanaĵo de tio, kion oni faras. El ĉi tiu vidpunkto oni prave rigardu la dancon. En si mem ĝi ne aspektas kiel granda afero, estas la samaj paŝoj denove kaj denove, kiuj nur per la enhavo de la balado ricevas sian signifon. [...]

Kompreneble estas plej intima rilato inter la enhavo de la balado kaj la danco. Se la rakonto estas malĝoja, oni dancas malrapide, se estas lukto, oni tretas forte la plankon, se rakontiĝas io amuza, la ritmo fariĝas vigla kaj kurema. La danco fariĝas daŭre esprimo de la etoso de la dancantoj – jes la pulso mem de la prezento."

Gravaj detaloj

Baladestrino feroa opinias ke estas tre grave ke homoj en la ĉendanco denove lernu aŭskulti. Nuntempe ili volas mem kunkanti kaj tio povas detrui la dancon. Cetere gravas ke:

- Havu granda parto de la dancantoj kutimon ĉendanci.
- La baladestro estu en bona humoro kaj bona stato.
- La dancejo havu bonan akustikon.
- La danca planko estu iom elasta, tio estas "resaltiva" aŭ "risorta". Diversas opinioj pri tio, kiom elasta ĝi estu.
- La lumo estu varmkolora, komforta kaj ne tro forta.
- Estu konvena nombro da dancantoj komparub la ejo, tiel ke oni venu proksimen unu al la alia.

La dancantoj havu inter si kontakton por ke la danco estu bona. Inter 20 kaj 120 dancantoj en ĉeno estas bona nombro.

Du baladestruĉoj rimarkigas ke por havi bonan ĉendancan vesperon ne sufiĉas nur bona danco. La socia kunesto en la paŭzoj kaj agrabla babilado kun aliaj dancantoj same gravas kiam la danco mem por bona travivaĵo. Prefere kombinu dancofeston kun manĝo, kantado, paroloj kaj amuzo.

Malbona danco

Alkoholo povas detrui ĉendancon. Ebriuloj ĝenas.

Homoj kiuj staras apud la ĉeno babilante ĝenas la dancon.

Unu baladestro demandas kion fari en tia kazo kaj mem respondas ke oni prefere ĉesu danci (antaŭ fino de balado) se estas ĝenaj homoj. Ĉar malbona danco detruas etoson kaj en aĉa kazo homoj tuj hejmeniras.

Mallertaj ĉendanculoj

Iu baladestro asertis ke "Ne nur eksterlandanoj, sed ankaŭ multaj feroanoj ne regas verson, ili nur movas la piedojn." Ili dancas meĥanike, senvive. Ili ne "vivas" (empatias) en la rakonton. Estas peze danci apud ili, "kvazaŭ teni saketon da faruno en ĉiu mano". Ili faras grandajn paŝojn, eĉ meze en la ĉeno. Oni povas vidi ke la dancopaŝoj ne estas aŭtomataj, ili kalkulas dum ili dancas.

Regi verson

Karaktero de bona ĉendanco estas malfacila klarigi. Oni movas sin nature. La ritmo estas en la korpo. La paŝoj estas elastaj kaj aŭtomataj. La ĉeno fariĝas "unu korpo".

Ne ekzistas nur unu ĝusta maniero ĉendanci kaj regi verson. Oni trovu sian personan stilon.

2. Konservado kaj tradicio

2a. Danca tradicio antaŭe kaj nuntempe:

Unue oni vivas la tradicion. Poste, kiam oni malkovras ke ĝi estas unikaĵo, oni komencas konservi la tradicion.

2b. La procedo de konservado:

Unuajn baladojn oni skribe notis en 1639 kaj sendis al antikveca esploristo Ole Worm en Kopenhago. Nur tamen inter jaroj 1820 kaj 1855 fariĝis granda intereso pri feroaj baladoj kaj oni tiam skribis multajn tekstojn. En la naciromantika tempo de la deknaŭa jarcento feroanoj komencis fieri pri siaj malnovaj baladoj. La unuajn melodiojn kolektis Hjalmar Thurén en jaro 1902.

La konservado de la danco mem komencis ankoraŭ 50 jarojn pli malfrue; en 1952 fondiĝis la unua dancasocio, "Dansifelagið i Havn".

Socio ŝanĝiĝis en la unua duono de la dudeka jarcento kaj iom post iom sian lokon en distrikta socio feroa danco

perdis kaj per tio sian funkcion. Kelkaj sociaj ŝanĝoj estis movpovo (aŭtoj, vojoj, tuneloj, flugmaŝinoj...), komunikado (radjo, televido, telefonoj, interreto...) kaj libertempaj aktivaĵoj (paraj dancoj, diskotekoj, festivaloj, teatro, ekspozicioj, koncertoj, sporto...).

2c:

Ŝanĝoj sociaj kondukas al novaj okazoj danci: instruado en lernejo, infandanco, ekzerca vespero en dancasocio, dancofestoj (kun invitilo), publika danco je festoj, prezentoj al turistoj kaj televido.

Iu filmo el Sumba (plej suda feroa vilaĝo) el jaro 1927 montras dancon multe pli rapida kaj vigla ol nuntempe kutimas esti.

Originaj dancokazoj estas ke la infanoj posedas la dancodomon, dimanĉa danco, sanktataga danco kaj delfenbuĉa danco.

Konservitaj dancokazoj estas geedziĝoj, privataj festenoj kaj nacia festo.

Kiam socio ŝanĝiĝas oni ne povas konservi tradicion sen ŝanĝo aŭ rompo, ĉar la kunteksto de la tradicio ŝanĝiĝas kaj kondukas al ŝanĝoj en la tradicio. Estas du konduteblecoj: Aŭ oni vivas la tradicion aŭ oni konservas ĝin.

Vivanta ĝin oni estas malferma al ŝanĝoj kaj evoluo. Risko estas ke oni distanciĝas tro de la origina tradicio kaj ke ĝia karaktero malaperas.

Konservanta ĝin oni amas la tradicion kaj provas protekti ĝin. Risko estas ke la tradicio fariĝas muzea kaj rigida kaj ne plu vivas.

Foje oni provas konscie krei ŝanĝojn, ekzemple iu verkis novan feroan nuptokanton. Foje la ŝanĝoj fariĝas aŭtomate kaj oni sentas sin senrega se oni ne ŝatas ilin, ekzemple ke la danco fariĝas pli kaj pli unueca kaj ke la samajn baladojn oni ĉiam kantas kaj rekantas.

Kelkaj baladestroj estas tradicion portantoj, aliaj pli progresemaj. Tio markas ilian vidpunkton pri la danco.

Kian ajn opinion oni tenas, ĝojo, entuziasmo kaj komforto tre gravas.

Feroa danco "sur scenejo"

Origine oni ĉendancis nur por sin amuzi, tio estis grava parto de la sociokultura vivo en la distriktoj.

Kiam disvolviĝis scienca intereso pri feroa danco, multiĝis la petoj por prezentoj kaj eksterlande kaj en Ferooj.

Plej multaj baladestroj diras ke surscenaj prezentoj neniam fariĝas vere bona danco. Iu diras ke povos esti bona etoso, sed eble ne bona danco. Ĝi estas "tro artefarita" – ĉio estas planita antaŭe, ĉio estas surscenigita, neniu spontaneo estas. Ĝi fariĝas meĥanika, mankas vivo en la danco, ĝi ne venas el la koro. Ĝi estas "bela kaj malsovaĝa".

Foje estas tro multaj nekutimantaj dancantoj en la ĉeno.

Scenon presente oni ludas la historion, sed oni ne vivas ĝin.

Feroa danco ne konvenas por scenaj prezentoj ĉar oni turnas sian dorson al la spektantaro,

tio estas, la spektantoj ne vidas tion kio okazas en la ĉeno – mime, okulkontakte – oni estu en la ĉeno por havi bonan travivaĵon. Estas strange kiam oni subite dancas por homoj kiuj estas ekster la ĉeno kaj ne por tiuj kiuj estas en la ĉeno.

Scene oni elektas elĉerpojn el diversaj baladoj por havi variecon. Tio signifas ke oni ne povas rakonti kaj vivi la historion, ĉar la historio rompiĝas en la mezo.

Ofte por prezentoj turismaj aŭ filmaj estas dezirate ke la dancantoj tradicie vestiĝu. Per tio oni substrekas ke oni montras sian nacian dancon kaj gravan kulturan heredaĵon. Do fariĝas pli serene kaj la danco havas "pli bonan stilon".

Baladestroj inter si ne konsentas ĉu tradiciaj vestaĵoj apogas aŭ ĝenas la etoson. Iu opinias ke oni tiam dancas alimaniere, pli solene, kaj ke plej bonan ĉendancon oni havas en ordinaraj vestaĵoj. Alia asertas ke en tradiciaj vestaĵoj oni pli facile empatias en la baladan rakonton kaj malnovan epokon, iomete kiel

aktoroj surmetub siaj kostumoj en teatro.

Repertuaro

En malnova tempo multaj baladestroj sciis milojn da strofoj, kelkajn baladojn oni kantis nur unu fojon por jaro, por havi ŝanĝon en la danco sed ankaŭ por malhelpi ke aliaj lernu la baladon dum la danco. Baladestroj aŭ familioj "posedis" certajn baladojn.

Hodiaŭ la repertuaro fariĝas ĉiam pli unueca. La samajn baladojn oni uzas denove kaj denove. Multaj dancantoj opinias ke estas pli amuze kiam ili scias la baladon, tio estas, ili ŝatas parkeri kaj la rekantaĵon kaj la strofojn.

Homoj atendas ke tiuj baladoj kantiĝu kiujn ili scias. Tio estas normala – kiam oni lernis ion oni evidente ŝatas uzi ĝin. La komuna repertuaro ne estas tre granda, pro tio nek la elekto estas tre granda kiam oni elektu baladon kiun ĉiuj scias. Multaj homoj eliras el la danco kiam kantiĝas longa, nekonata balado.

Unu kantestro rimarkigas ke homoj ne plu emas aŭskulti, kaj tio estas granda problemo.

En dancasocio estas alie, oni povas meti longajn nekonatajn baladojn en la programon, homoj atendas tion, ili povas iomete "antaŭstudi", kaj do ili partoprenas la dancon kaj ĝuas la travivaĵon.

En dancasocio oftas ankaŭ tio, ke oni lernas unu aŭ plurajn novajn baladojn ĉiun jaron, tio certe estas bona afero, ĉar tiel iom post iom homoj ekhavas pli grandan repertuaron. Sed: Ĉiuj lernas la saman, do la asocio kreas komunan repertuaron kiu ne estas tre granda, ne estas tiel ke diversaj baladestroj lernas diversajn baladojn por ke la repertuaro disvolvigu sin kaj oni havu pli da baladoj inter kiuj elekti.

Se oni ne estras kaj tamen volas lerni kelkajn baladojn, oni evidente lernu tiujn kiuj plej ofte kantiĝas. Ja ne utilas lerni preskaŭ formortintan baladon kiun oni neniam travivos ĉendance, tiun oni aŭtomate reforĝas.

Estas kvazaŭ malbona cirklo: Popularan baladon oni ofte utiligas dance, homoj sentas ke ili lernu la baladon por povi

kunkanti, do estos eĉ pli da dancantoj kiuj scias la baladon, do ĝi utiliĝas eĉ pli...

Du malaj vidpunktoj

La rilato al la demando pri repertuaro estas intime ligita al la diversaj perspektivoj, supre menciitaj, kiujn oni povas havi pri feroa danco. La ekstremaj pozicioj estas, ĉu vivi la dancon, ĉu konservi la dancon. Plej multaj feroanoj staras ie inter tiuj du ekstremaj maloj.

"Vivi la dancon" – agrable-dancantoj opinias ke:

- Estas agrable kiam ĉiuj povas kunkanti.
- Ne gravas se la baladoj fariĝas "tro uzataj".
- Plej gravas ke feroa danco estu bona kaj amuza sociala travivaĵo.
- Oni dancas por renkonti homojn.
- Ĉiuj povas lerni baladestri.
- Estas amuze kiam homoj saltas kaj forte tretas.
- Ĉiuj ekregas verson se ili kutimiĝas danci.

"Konservi la dancon" –
tradicion portantoj opinias ke:

- La baladestro posedu la baladon.
- Homoj lernu aŭskulti.
- Ankaŭ longajn kaj nekonatajn baladojn oni uzu foje.
- Plej gravas ke feroa danco kia unika kultura heredaĵo konserviĝu.
- Oni dancas por travivi baladon.
- Nur malmultaj homoj naskiĝas kun la talento baladestri.
- En nuntempa dancado homoj tro saltas kaj stamfas.
- Se oni ne havas la dancon ek de infanaĝo, povos esti malfacile ekregi verson.

Tradicie dancantoj kaj agrable
dancantoj ofte ne sufiĉe

respektas unu la alian, oni opinias ke oni mem havas la "ĝustan" opinionon kaj la alia eraran, "ili ne komprenis pri kio temas feroa danco".

Certe feroa danco ĉiam estis bona kaj amuza travivaĵo, aliokaze oni ne estus dancintaj kaj konservintaj la ĉendancon dum jarcentoj.

Plej grave ankaŭ hodiaŭ estas ke oni ricevu bonan travivaĵon kaj ke oni ŝatu danci. Kelkaj ricevas bonan travivaĵon kiam ili provas danci kiel en malnova tempo kaj konservi la tradicion, pri kiu ili fieras. Aliaj ricevas bonan travivaĵon kiam ili kantas mallongajn popularajn kantojn kaj povas ĝoji pri tio, ke ili tion kapablas – kaj tio estas taŭge bona!

Enkonduko

Feroajn baladojn oni ankoraŭ kantas kun tradicia ĉendanco. La baladestro ludas gravan rolon ĉar lo rakontas kaj vivas la enhavon de la balado helpab siaj voĉo, dancopaŝoj, korpaj movoj kajaŭ okulkontakto kun aliaj dancantoj.

Ĉiuj baladestroj diras tre klare ke en la danco plej gravas la balado kaj ĝia enhavo.

Kiam oni lernis la tekston tio ne aŭtomate signifas ke oni povos ankaŭ bone irigi la dancon.

Iu baladestro kritikas tion ke kelkaj feroaj instruistoj lernis multon pri baladoj en la instruista altlernejo, sed ili ne lernis danci kaj tial nek povas instrui la dancon en lernejo.

Unuavide feroa danco konsistas el teksto, muziko kaj danco, aŭ alivorte el la enhavo kaj melodio de la balado kaj la speco de danco. Responde al tio estas esploristoj pri literaturo, muziko kaj danco kiuj prilumis ĝin el siaj diversaj perspektivoj. Sed fakte apartenas pli da aferoj. La baladestro respondumas pri teksto, muziko kaj dancoformo. (Lo povus eĉ stari plej supre en la diagramoj).

Eksteraj kondiĉoj influas la dancon.

La prezenton influas lingvo (ĉu dana, ĉu feroa), la voĉo de la baladestro, la dancejo, la etoso, interagado, korpaj movoj, dancopaŝoj, la dancoĉeno.

Kio okazas dum la danco? Kiumaniere la baladestro igas la dancon? Kiel lo metas la tekston "sub la piedon" (tio estas, regas verson)?

Konservado kaj tradicio

La baladestro mem estas parto de la dancotradicio kaj portanto de la tradicio.

Tradicio estas grava taksilo por la kvalito de la danco, "bona danco".

Oni aŭtomate ĉuaŭ nekonscie komparas la aktualan dancosituacion kun la tradicio kun kiu oni kreskis kaj la spertoj kiuj markis onin. Per tiu maniero oni taksas la dancon kaj ĝian kvaliton.

Esti baladestro


La baladestro feroe nomiĝas "skipari" (kreisto). La verbo "skipa" signifas krei, aranĝi, decidi, meti sur lokon aŭ antaŭkanti en ĉendanco. La

baladestro do estas iu kiu ion ordigas.

La vorto "antaŭkantisto" estas nesufiĉa:

Unue, oni ne vere kantas en la danco, oni "kvøð"-as, tio estas, recitas, do alia maniero uzi sian voĉon.

Due, la baladestro ne nur kantas, lo gvidas la tutan dancon. Lo respondumas pri teksto, melodio, rekantaĵo, tonalto, dancopaŝoj, ritmo, rapido, dramatiko, etoso, interpreto, interagado kaj la tuto dependas je loa propra humoro kaj ĝenerala stato. (Kiam oni malvarmumas eble ne iras bone).



Ĉendanco feroa. Bildocentre dancas la reĝino de Danujo.

& Kiel parkerigi:

Maniero lerni

Antaŭ la danco: La procedo lerni – tekston, melodion kaj dancopaŝojn.

Estas du diversaj lernomanieroj. Unu estas instruo – en lernejo aŭ dancasocio – kie instruisto klarigas kiel oni faru, kio estas ĝusta kaj kio estas erara. Alia estas lerni mem, do aktivan proceduron per helpo de imitado. En malnova tempo oni lernis en la loka socio. Nuntempe instruiĝas en lernejo, infandancoklubo kaj dancasocio grave rolas dum lernado.

Elekti baladon

Foje iu havas personan rilaton al balado, ekzemple ke ĝi kantiĝis en la familio, ĝi ne formortu, ĝi estas malnova loka tradicio kaj tiel plu.

Oni povas ankaŭ inspiroĝi per libro: Foliumante libron da baladaj tekstoj, oni kaptiĝas de iu rakonto.

Eble plej grava estas inspiroĝi en la danco, kie oni aŭdas baladon kaj ekemas lerni ĝin

ĉar kaj la teksto kaj la melodio interesas.

Foje dancasocio demandas al membro ĉu tiu ne ŝatus lerni certan baladon por estri ĝin.

Baladon povas rekomendi ankaŭ amiko. Homo el feroa Sudinsulo rakontis ke estis kvazaŭ konkurso: Ĉiun semajnon oni venu kun io nova.

Tekston parkerigi

Kiam oni mem ŝatas la tekston estas facile lerni ĝin. Kiam la teksto ne kaptas onin, estas malfacile lerni ĝin!

Mallongajn kantojn kiuj ofte utiliĝas oni ja povas lerni en la danco.

Oni povas ankaŭ lerni de siaj gepatroj aŭ geavoj kiam ili kantas baladojn hejme.

Sed kiam oni lernas estri oni havu la tekston en la mano. Plej ofte la baladestro uzas libron, foje sian propran, manskribitan version.

Kiam la balado havas klaran, daŭran agaron oni povas orientiĝi per la agaro, vidante

la figurojn antaŭ si kvazaŭ en filmo. Eblas ke oni perdas unu aŭ du strofojn foje, tamen oni rapide retrovas la rakonton.

Ĉe balado aŭ kanto kun lirikaj elementoj kaj multaj priskriboj, "malfiksajn strofojn kun vico kiu estas preskaŭ egala", oni povas nur "okule foti" la tekston kaj vidi ĝin antaŭ si, tiel ke oni ĉiam sciu ĉu oni alvenis plej malsupren je unu paĝo aŭ plej supren en la sekva paĝo.

Alia diras ke se oni perdas unu strofon oni perdas la tuton, estas malfacile "remeti la kanton en ĝustan lokon".

Helpas se oni strukturigas la baladon. Se estas okdek strofoj eble oni povas grupigi ilin als ok- aŭ dekopoj.

Oni povas krei rilaton de unu strofo al la sekva, trovi memorregulon. Oni povas ankaŭ trovi la kernajn vortojn de la strofo kaj uzi ilin por memori.

Unu fojon lerninta baladon, tio ne signifas ke oni parkeras ĝin por ĉiam. Oni ripetu ĝin kaj "poluru ĝiajn flankojn" antaŭ ol oni suriras la dancoplankon.

Unu baladestro diris ke nokte kiam li sendormas li ripetas baladajn tekstojn por endormiĝi.

Alia diras ke la libro ĉiam restas en la necesejo.

Lerni melodion

Oni ne uzas notlibrojn aŭ muzikinstrumentojn por lerni la melodion. Normale la baladestro konas la melodion antaŭ ol lo komencas lerni la tekston.

Plej kutime oni lernas la melodion en la danco. Unu estro diras: "Por lerni ĝin bone oni lernu ĝin en danco, alie oni ne ekhavas la ritmon en la korpon."

Oni povas peti konsilojn de alia baladestro, de aliaj pli aĝaj homoj en la distrikto aŭ de sia gepatroj.

Lerni la ritmon – ekregi verson

En la malnova kamparana socio homoj kantis baladojn dum ili laboris hejme en la vespero. Ili ripetis la tekston kaj melodion preparante sin por la danca sezono kiu komenciĝis post julio (vintromezo). Ili ne dancis

hejme, sed la piedoj povis
moviĝi dum ili staris
laborantaj, ili povis marki la
ritmon per la piedo.

Iu baladestro rakontas ke
feroanoj kantis baladojn dum
ili tranĉlaboris pri fiŝoj sur
ŝipe. Ili ne dancis, sed uzis la
piedojn iomete kaj uzis sian
tranĉilon pli energie kiam estis
lukto kaj batalo en la balado.

Hodiaŭ ankoraŭas kombino de
laboro kaj kanto. Unu
ekzemple diras ke li ĉiam
dancas feroe kun la
polvosuĉilo. Alia kantas ritme
kaj uzas la korpon dum li
kuiras aŭ laboras en sia

ĝardeno. Tria kantas kiam ŝi
lavas telerojn.

Multaj aŭskultas kaj kantas
baladojn kiam ili veturigas
aŭton. Tiam oni povas uzi
maldekstran piedon por marki
la ritmon, sed prefere ne la
dekstran. (Iu rakontas ke
feroano kantante uzis sian
dekstran piedon en aŭto, li
tretis sur la gaspedalon kaj
polico haltigis lin, verŝajne ĉar
la aŭto veturis en tre stranga
maniero).

Unu dancas en sia tagĉambro
"por ekhavi la tekston sub la
piedon", alia en sia kuirejo
"por meti la ritmon kaj la
dancopaŝojn en ĝustan lokon".

& Kiel regi:

Baladon elekti

Baladestro ofte preparas plurajn baladojn, ripetante tekston, "polurante ĝiajn flankojn", pensante "eble mi prenos tiun aŭ tiun ĉi vespere".

Ofte okazas ke oni ne prenas tiun baladon kiun oni planis. Ĉu oni prenas ĝin aŭ ne, tio dependas je diversaj aferoj: Kia estas la etoso? Kiajn baladojn ni jam dancis – seriozajn, amuzajn, danajn, feroajn...? Kiu eble venos en la dancon se mi prenas tiun? Kiu eliros? Kiom da homoj konas la tekston? Ĉu iu povas danci apud mi por helpi min?

La balado kiun oni elektas devas konveni al la okazo, kio povas esti publika danco, danca festeno, danca vespero en la dancasocio aŭ tiel plu, kaj al la partoprenantaro.

La danco estas momento de ĝojo kaj oni ne detruu ĝin per elekti eraran baladon. Ja eblas kanti baladon kiun oni preparis sen iel ajn konsideri la cirkonstancojn, sed tiam ofte ne iras bone.

Oni ne pensu: "Nun mi montros kion mi kapablas!"

Baladon estri

Estas granda diferenco inter estri baladon unuan fojon kaj dekan fojon. Unuafoje ĝi estas pli ekscita kaj oni pli koncentriĝas, kio estas pozitiva sento. Se oni ofte estras saman baladon povas okazi ke la pensoj vagadas en tute alian direkton kaj oni perdas strofojn.

Unu baladestro diras ke unuan fojon la balado estas en la kapo kaj iom post iom ĝi malsupren iras en la korpon.

Alia atestas ke kiam oni estris la baladon ses- aŭ sepfoje oni poiome komencas vivi ĝin. Unuan fojon oni tre fokusiĝas pri la teksto, poste oni konas la tekston tiom bone ke oni povas koncentriĝi je aliaj aferoj kaj "vivi" la rakonton; la prezento fariĝas pli kaj pli bona ĉiufoje. Ŝi diras ke bone povas malkovri novajn flankojn kaj detalojn en balado ĉiun fojon, tiel ke la prezento ĉiam estas alia kaj nova. La prezento fariĝas pli ornamata, pli drama.

Baladon posedi en danco

La tekston kaj rakonton ĉiu opinias als kerna.

Nuntempe ofte estas tiel ke unu versio de balado estas ĝenerale konata kaj aliaj homoj en la dancoĉeno opinias ke estas erara se oni forgesas strofon. En antaŭa tempo la teksto ne estis tiom fiksa, oni vere povis ellasi kelkajn strofojn el la balado se la etoso ne estis tiom bona aŭ eltrovi novajn strofojn se la etoso estis ege bona aŭ prunti strofojn de alia balado. Tio fakte estis atendata kaj markis bonan baladestron.

Estas grave ke la estro sola kantu la unuan verson tiel ke lo povu gvidi la vicordon de la teksto kaj karakterigi la dancon. Se la estro ne ricevas liberon kanti la unuan verson de ĉiu strofo mem, ofte lo perdas regon.

Unu estro substrekas ke estas grave ke homoj en la danco denove lernas aŭskulti. Hodiaŭ multaj ne emas aŭskulti, ili volas mem kanti kaj tio povas detrui la dancon.

La estro gvidas...

Iu estro diras ke venas multaj pensoj: Kiu estas en la danco? Kiu estas apud mi? Ĉu pli da homoj envenos en la dancon? Ĉu mi tretu (forte) aŭ ne? Kie mi komencu? Ĉu mi kantas tro alde? Aŭ tro base? Kiel komenciĝas la sekva strofo? Kaj tiel plu.

Melodion oni provas kanti nek tro alte nek tro malalte. Se fariĝas malĝusta tonalteco, oni konscie supren- aŭ malsupreniĝas voĉe.

Verse, oni havu la paŝojn en ĝustan lokon. Eblas komenci strofon kaj per dekstra kaj per maldekstra piedo.

Negravaŭ per kiu piedo oni volas komenci, eblas ĝustigi la dancopaŝojn rilataŭ la akcento en la kanto: Oni povas uzi aldonajn vortojn kiaj "kaj" aŭ "sed" por enigi kroman paŝon en verson, aŭ oni povas uzi "transirajn tonojn", tio estas kantas du tonojn kun (normale) du paŝojn en unu sola silabo.

Tempe, oni dancu nek tro rapide nek tro lante, ĉar la danco fariĝos aŭ tro maltrankvila aŭ tro peza. Iu avertas ke oni ne dancu pli rapide por vivigi la dancon,

ĉar tio ne funkcias. Por vivigi ĝin oni intensivigu sian kontakton kun la aliaj dancantoj!

Oni tenu okulkontaktan kun aliaj dancantoj apudaj aŭ preterpasantaj, por rakonti la historion al la partoprenantoj. Evidente eblas ankaŭ rigardi supren, en la aeron, por memorigi al si la strofojn.

La teksto ludas plej gravan rolon. Dum la rekantaĵo kantiĝas la baladestro ripozas, preparas sin por la sekva strofo kaj demandas al sia najbaro se lo malcertas.

Kiam oni perdis strofon oni decida ĉu oni kantu ĝin kaj rearanĝu la vicordon de strofoj, ĉu oni kontentu kvankam la strofo mankas. Plej gravas ne ke ĉiuj strofoj kantiĝu, sed ke la historion oni rakontu tiom bone kaj kapte kiom eble. Ĝia okazaĵaro estu en la centro.

Akcentaj markigoj

Por konstrui eksciton kaj interesi la aliajn dancantojn oni markas aŭ substrekas unuopajn strofojn.

Kion oni faras, tio dependas je la enhavo. Citub Jørgen-

Frantz Jacobsen: "Se la rakonto estas malĝoja, oni dancas malrapide, se estas lukto, ona stamfas la plankon, se rakontiĝas io amuza, la ritmo fariĝas vigla kaj kurema." (Enkondukon, vidu supre).

Iu baladestro diras ke kiam estas bona strofo venas "pli da viglo".

Balado disvolvas sin en ondoj kun dramaj kulminoj kiujn oni akcentu kaj ripoztempoj kiujn oni kantu kviete. Se oni fortetretas ofte oni ne povas nuanci la kulminojn.

Plej multaj baladestroj opinias ke povas esti "tro multe da bonaĵo", ke saltiĝas kaj stamfiĝas tro multe en nuntempa dancado kaj ke "tio nenie apartenas". Kelkaj tamen diras ke estas nur amuze kiam homoj kantas laŭte, saltas kaj stamfas ĉar ili gajas kaj tio estas nur bona.

Markige oni povas danci sur loko ("stari kaj vivi"), uzi la brakojn, tio estas teni pli firme, kanti pli forte, salti, stamfi la plankon, esprimi sin vizaĝe kaj okule kontakti.

Unu rimarkigas ke se oni havas bonan voĉon oni povas akcenti per ĝi, kaj tiu kiu ne

havas bonan voĉon akcentu per la korpo.

Kelkaj diras ke "tio nur okazas", tio estas ili akcentas la strofojn spontanee, aŭtomate kaj nekonscie, "oni nur kunestas en la spektaklo".

Aliaj diras ke ili decidas antaŭe kiel kaj kiam ili substreku la enhavon. Iu atestas ke ŝi havas siajn favoratajn strofojn kaj tial ĉiam markas la samajn strofojn. Alia ĉiam malkovras ion novan en la teksto, kio igas ĝin tiom ekscitiga.

Kelkaj baladestroj inspiriĝas de la dancoĉeno: Kiam ili vidas ke dancantoj opinias ke ĉi strofo estas speciale amuza aŭ grava, ili komencas ankaŭ akcenti ĝin.

Unu observas ke ĉiu estro havas siajn plej ŝatatajn strofojn kiujn lo akcentas, tial ĉiu estro prezentas la baladon en individua maniero kaj oni ĉiam ricevas alian travivaĵon. Markigoj do kondukas al individueco.

Kiel evolui:

Laŭdo kaj kritiko post la danco

Ĉiuj baladestroj asertas ke oni mem sentas ĉu la danco iris bone aŭ ne.

Eĉ eksterlandano povas senti ĉu la etoso estas bona, eĉ se lo ne komprenas pri kio temas la balado.

Oni bone scias kiujn strofojn oni forgesis.

Povas okazi ke oni parolas kun la apudestro pri tio, kiel iris la danco.

Verdire oni ricevas nur pozitivan kritikon de aliaj dancantoj. Plej multaj estroj memoras ke oni laŭdis ilin kiam ili estis infanoj.

Multaj opinias ke estas nur du aferoj kiujn oni povas kritiki: la tempon ("pli malrapide venontfoje") kaj tonalton ("vi kantis tro alde" aŭ "tro base").

Lerni baladestri

Ĉiuj konsentas ke infanojn oni laŭdu por ke ili estu fieraj kaj emu daŭrigi. Al infanoj estrintaj oni rimarkigas la

bonajn aferojn kaj silentas pri tio kio ne tiom bone iris. Oni provas apogi infanojn per laŭdo kaj subteno. Eblas ankaŭ ekzerci kun ili hejme, danci apud ili en la ĉeno kaj iom transpreni kiam ili forgesas la tekston.

Ne eblas instrui baladestrandon. Unu demandas: "Kiel oni klarigu al alia homo kiel li rakontu la historion? Ja estas multaj diversaj eblecoj rakonti ĝin."

Alia asertas ke oni devas mem malkovri kiel estri.

Ne estas kiel en lernejo, muzika lernejo aŭ dancolernejo, kie instruisto konsilas kaj klarigas kiel oni faru. Oni ne havas gvidanton kiu helpas kaj diras kion oni faru alimaniere por pliboniĝi. Ŝajnas iom ke oni estas sola en la lernado estri kaj povas esti dura tasko malkovri aferojn.

Avantaĝo estas ke oni ne provas imiti sian instruiston.

Propra stilo

Oni provas esti si mem kaj trovi sian propran stilon. Homoj tuj sentas se estro estas si mem aŭ lo "ludas teatron" (afektas).

La personaj karakteraj trajtoj konturiĝas kaj ludas rolon kiam oni estras baladon. Homo trankvila kaj pripensema en ĉiutaga vivo ankaŭ estras en trankvila kaj iom malrapida maniero, dum vigla homo estras pli vigle, pli saltas kaj tretas kaj pli laŭte vokas.

Homo kiu facile montras siajn sentojn tuŝas kaj kaptas homon en la dancoĉeno tuje. Homo kiu kutime kaŝas siajn sentojn laboras pli per la korpo por rakonti la historion. Ĉu viroj estras alimaniere ol virinoj?

Unu viro respondas ke viroj preferas lukajn kaj heroajn baladojn dum virinoj preferas amkantojn.

Unu virino vidas tute alian diferencon inter viroj kaj virinoj: Al viroj ne tro gravas, ili nur provas kaj ne multe pensas pri siaj eraroj. Virinoj estas perfektismaj, ili ne kuraĝas estri ĝis ili centprocente certas ke ili bone

kapablos. Ili ankaŭ estas pli memkritikaj poste kaj ĉagrenas siajn erarojn.

Ekzerco aŭ talento

Kiu kapablas estri kaj kiu estru?

Virino diras ke ĉiuj kapablas estri, precipe virinoj devus pli ofte kuraĝi estri.

Ĉiu estro havas sian propran stilon kaj tio estas nur bona.

Unu viro diras ke ne ĉiuj kapablas estri. Tiuj kiuj ne bone estras tenu sin for de tio kaj eltrovu al kio ili bone taŭgas – ekzemple apogi la estron.

Kaj evidente kelkaj ricevis pli bonan talenton irigi dancon ol aliaj – kiel pir ĉio alia – ne ĉiuj same lertas.

Iu diras ke oni ne naskiĝas bona estro, oni multe ekzercu, tio estas, oni kaj dancu multe kiel "ordinara" dancanto en la ĉeno por travivi kaj intimiĝi kun la etoso kaj ekhavi la versojn en la korpon, kaj oni ekzercu estri, oni provadu kiel oni povu kapti kaj entuziasmigi homojn.

Alivorte: Talenton, intereson kaj egan ekzercadon.

Kondiĉoj por fariĝi bona baladestro

Oni ne devas havi fortan voĉon por fariĝi bona estro.

Sed oni havu bonan memorkapablon. Tamen: Tio kion oni lernas kiam infano pli fikse restas ol tio kion oni lernas en plenkreska aĝo.

Oni estu empatia, tio estas veka kaj sentema pri aliaj dancantoj. Oni sentu kion ili atendas kaj kiel ili fartas.

Estu fleksebla (adaptiĝema) pri rapideco kaj tonalteco.

Gravas ke oni estu memkonscia kaj ne aspektu malcerta, ĉu oni bone preparis sin ĉu ne. Malcerteco igas negativan elradiadon. Oni ne povas gvidi kaj konduki aliajn kiam oni mem estas malcerta.

En tiu kazo povas okazi ke aliaj prenas la baladon de la estro ĉar ili sentas ke lo bezonas helpon.

Oni lertu pri kiel ricevi atenton, kiel entuziasmigi homojn kaj per sia elradiado kaj per la interpretado de la balado. Talenton oni havu por "kunŝiri" la aliajn dancantojn.

Samtempe oni humilu antaŭ la balado, ĉar la balado staru en la centro, la estro estas nur peranto. Ne pensu "Jen venas mi!"

Modeloj

Plej multaj baladestroj ne havis specifajn modelojn aŭ idolojn kiujn ili admiris. Foje tamen menciigis iu nomo.

Estas pli kutime ke oni memoras iun vesperon kiam certa balado iris malordinare bona ol ke oni memoru estron. Kiam oni memoras estron, tio ofte ligiĝas kun iu specifa travivaĵo.

Tio estas iom speciala, ĉar alie (en aliaj muzikaj genroj) oni konas la nomon de certa kantisto aŭ muzikisto, sed oni ne povas memori kion tiu prezentis en la koncerto. Do en profesia muzika mondo la nomo de la artisto pli gravas ol ties repertuaro.

En feroa danco estas inverse, ĉar la estro ne prezentu kaj surscenigu sin mem – male: La balado estas en fokuso, lo rakontu ĝian historion. La balado kaj ĝia rakonto estas pli gravaj ol la estro, loa personeco kaj loa interpreto.

Bona aŭ malbona danco

Bona danco

Kio estas "bona danco"?

- En bona danco la estro havas "pacon" por estri ĉiuj "kunŝiriĝas" en lian prezenton.
- Unu estro vortigas ke la dancoĉeno "fariĝas unu korpo", per komuna travivaĵo.
- Ekestas sento ke oni apartenas kune, ĉiuj estas egalaj senkonsiderub kiuj ili estas alie en la ĉiutaga vivo.
- Estas pli facile ekhavi bonan dancon kiam oni dancas kune kun homoj kiujn oni konas, ĉar oni scias kiel ili funkcias kaj kiujn baladojn ili konas kaj ŝatas.
- Granda parto de la dancantoj havu kutimon danci.
- La estro estu en bona humoro kaj bona sano.
- La dancejo havu bonan akustikon.
- La dancoplanko estu iom elasta, sed la baladestroj ne interkonsentas kiom elasta.
- Estu varma, ne forta lumo.
- La nombro da dancantoj estu konvena por la ejo, tiel ke oni venas unuj proksime al aliaj,

oni havu kontakton inter si por havi bonan dancon. Bona nombro estas inter dudek kaj cent dudek dancantoj. Iu aldonas ke dependas je la balado kiom da dancantoj estu, kaj ke tio estas interesa demando.

La estro povas regi nur elekton de balado, prezenton, rapidecon, ritmon kaj tonalton.

Kelkaj diras ke por havi bonan dancovesperon ne sufiĉas bona danco. La sociala kunesto en la paŭzoj, kaj havi bonan interparolon kun aliaj dancantoj same gravas por bona travivaĵo kiom la danco mem. En dancofesteno estu manĝaĵo, kantado, paroloj, agrablumo, babilado kaj societa kunesto.

Malbona danco

Kio do estas malbona danco?

- Alkoholo povas detrui dancon. Ebriaj homoj ĝenas.
- Malbone estas se tro multaj homoj ne kutimas al danco, kiuj eĉ ne konjektas la esencon de danco.


- Malbone estas se la estro ne povas gvidi la dancon, sed "ĉiuj faras kion ili volas", homoj ne aŭskultas kaj elektas sian propran rapidon.
- Malbonaj estas betona planko, malbona akustiko kaj tro akra forta lumigo.
- Malbone estas tro multaj aŭ tro malmultaj homoj.
- Malbona estas balado kiu ne konvenas al la etoso kaj la partoprenantoj.
- Malbone estas se la samaj baladoj tro ofte danciĝas.
- Malbonaj estas tro multa drameco, tro grandaj movoj, tro da saltado kaj stamfado kaj tro da kriado.
- Malbone estas se la balado prezentiĝas tro alte aŭ tro rapide.
- Malbone estas se homoj staras apude kaj detruas la dancon per sia babilado.

Nu, kiel do? Ĉu oni eltenu aŭ ĉesu? En dancasocio ne estas problemo se oni ĉesas post dek aŭ dudek strofoj. En publika danco oni ne ofte faras tion, sed oni devus, ĉar malbona danco detruas la etoson. En plej malbona kazo homoj hejmeniras.

Konkludo

Feroa danco estas multflanka fenomeno, el kio ĉi tie prilumiĝis nur kelkaj aspektoj. Estas tre malfacile klarigi kio okazas dum la danco, ĉar multaj diversaj parametroj ludas rolon. La plej gravaj estas la dancoĉeno, la estro, la dancejo kaj la balado.

Kiam la estro kapablas rilati bone al la balado, la dancoĉeno kaj la ecoj de la dancejo, tiam fariĝas bona danco.



Ĉendanco feroa. Bildocentre dancas la reĝino de Danujo.

lom pri takto

'&6. Kiel verki:

Esenco de balado estas ĝia rakonto. Komuna tasko de verkisto kaj baladestro estas kapti la atenton de la dancantoj. Gravas kaj la enhavo kaj la strukturo.

Utilo

Balado povas plenumi plurajn funkciojn samtempe:

Ĝi povas kontribui al agrablo de sociala kunesto dum kaj lokaj kaj internaciaj kunvenoj, kongresoj kaj junularaj tendaroj en esperanto.

Ĝi povas esti bona ekzerco de la lingvo por komencantoj aŭ tiuj, kiuj malofte havas okazon paroli la lingvon en sia proksima ĉirkaŭaĵo. Pro ĉi tiu kialo estas avantaĝo se proverboj kaj kutimaj parolturnoj povas esti enplektitaj en la balado.

Trie, verece kaj sciplene verkita nova balado povas esti bona historia instruo al parolantoj, kiuj ofte havas maltaŭgajn sciojn pri la historio de esperanto kaj naivan sintenon al la opozicio kiun renkontas la lingvo. Evidente balado povas ankaŭ aliajn valorajn lecionojn de vivo komprenigi al la dancantoj.

Difino

Baladon mi proponas difini jene:



- Ĝi havu minimume kvin strofojn.
- Ĉiuj strofoj estu ritme samformaj (samstrukturaj), prefere ankaŭ rime. Alivorte, ĉiuj strofoj taŭgu por unu sama melodio.
- Estu rekantaĵo(j), kiu senŝanĝe samvortas en ĉiu strofo. Ju pli longa rekantaĵo kompare al la strofo, des pli bone. Plej bone estas se la rekantaĵo daŭras iom pli ol la duono de ĉiu strofo. Alternative (aŭ aldone), iuj vortoj de ĉiu strofo ripetiĝu, ĉiam en la sama maniero (samaj lokoj en la melodio).
- Dezirinde, sed ne nepre, la balado rakontu iun historion (aventuron aŭ okazaĵon).

Rekomendoj

Sed se oni volas krei novan baladon en alia lingvo (do en esperanto), kiel oni povas tiam dedukti ĝian stilon al feroa tradicio? Mia elekto tielis:

- La rapido estu bona por balada danco, ĉirkaŭ <1,4-1,8:> takterojn (batojn, paŝojn) por sekundo. (Tio estas inter 84 kaj 108 battoj por minuto).
- La rekantaĵo estu la pli granda (multtaktera) parto de ĉiu strofo.
- Tiu parto de la strofo kiu ne estas rekantaĵo sekvu la modelon de (4; 3; 4; 3;) takteroj por verso, kie la vortoj en ĉiu sepa taktero rimas.
- La nombro da takteroj en ĉiu strofo estu prefere 29 aŭ 31, duaelekte alia primo, triaelekte nombro ne dividebla per 6, nek per 3.
- La lasta silabo en la rekantaĵo daŭru inter unu kaj du takterojn, tiel ke la ligo al la sekva strofo estu ritme simpla por kanti.
- La melodio ne ampleksu pli ol unu oktavon.
- La melodio enhavu du aŭ tri volvojn de simila tonaro (melodia temo).
- Prefere kelkaj vortoj en la rekantaĵo ripetiĝu (tio estas, kantiĝu dufoje en la sama strofo).
- La balado rakontu pri persono en certa okazaro. La persono estu aŭ

karaktera aŭ grava por la historio de esperanto.

- La rakonto dramigu helpab dialogoj.
- Kiom eble plej malmultaj homoj nomiĝu per nomo.

Oni ne devas ĉiufoje trafi ĉiujn tiujn kriteriojn, sed oni klopodu trafi almenaŭ multajn el ili.

La rekantaĵo

Gravas la rekantaĵo! Rekantaĵo donas al la baladestro "pripensopaŭzon" por memori venontan strofon kaj tiel plu. Ĝi donas ankaŭ al la dancantoj eblon pripensi kaj pli bone kompreni la ĵus kantitan strofon. Tial prefere uzu rekantaĵon ĉiamsaman kiu minimume samlongas kun la cetero de la strofo (tio estas, kun la rakonta parto).

Bona balado havas longan rekantaĵon, prefere eĉ pli longan ol la rakonta parto de la strofo mem. Tio havas plurajn avantaĝojn aŭ funkciojn:

- Longa rekantaĵo donas al baladestro tempon por ripozigi sian voĉon, pripensi la tekston kaj memori la venontan strofon.
- Helpab tiuj ripozoj eblas estri eĉ tre longajn baladojn.
- La dancantoj povas kanti dum pli granda parto de la ĉendanco.

Estas tri gvidaj principoj por vortigo de rekantaĵo. La rekantaĵo povas:

- ĉu doni iun kernan mesaĝon de la balada rakonto,
- ĉu temi pri tio, ke oni nun agrable dancas kune,
- ĉu esti facile direblaj vortoj kiujn agrablas elparoli pro aliteracio aŭ alia sonpoezio.

La tri principoj ofte malkongruas inter si, do foje oni devas elekti.

Melodio kaj ritmo

La melodio mem ne estas plej grava parto de balado. Pli gravas ĝia ritmo. Estu malpara, prefere prima, nombro da batoj por strofo. Tio donos al baladestro eblon manipuli la takton tiel ke ekzemple certa piedstamfo trafos certan vorton (okazaĵon) en la rakonto.

Kompone oni do klopodu malhelpi ke la dancantoj "fiksiĝas" en iun certan ĉiam revenan sinsekvan paŝadon ĉiustrofe saman.

Evidente eblas ĉendanci ankaŭ baladojn kies strofo havas nombron da batoj divideblan per du, aŭ per tri. Tia nombro ĝenerale riskas forpreni sentojn de fluo de la balado kaj pelo de la ritmo. Do estu nombro prima, aŭ nombro kiu divideblas nek per du nek per tri. Tiel prefere estu ne nur por la tuta strofo sed ankaŭ por ĝiaj partoj, tio estas ĝiaj versoj

kaj melodipartoj ripetataj, eĉ se ne por ĉiuj el ili.

Baladigi jam ekzistantan poemon

Oni povas al jam verkita poemo doni melodion kaj rekantaĵon. Aŭ oni trovas jam ekzistantajn tiujn el alia balado aŭ oni faru novajn mem.

Pri poemoj indas atenti pri kelkaj fojaj malavantaĝoj aŭ problemoj:

- Ĝi enhavu sufiĉe multajn strofojn kiuj ĉiuj sekvu saman modelon de ritmo, kaj prefere ankaŭ de rimoj, por ke ĉiu strofo konvenu al unu sama melodio.
- Preferinde ĝi diru iun rakonton. Poemo kiu esprimas nur ekzemple la sentojn de la poeto mem fariĝas malpli inspira balado. Rakonto en tria persono ("li"- aŭ "ŝi"-forma) preferindas al unuapersona ("mi"-forma).
- Lingve estas malavantaĝo se frazo en la poemo pludaŭras de unu strofo ĝis la venonta strofo, ĉar tio postulas pli streĉan aŭskulton de la dancantoj por sekvi la rakonton trans la rekantaĵo. Simile, estas bone se la naturaj partoj de la frazo dividiĝas laŭ la vicoj (versoj) en la strofo.

'&7. Kiel tonsilabi:

Tonsigno:

Tonsigno kun dupunkto #: signifas komencon de tonsilaba peco, kun aŭ sen la peca nomo inter ili. Tonsigno kun la nomo sen dupunkto montras kie (t.e. kiam) la peco ludiĝas denove.

& Gamo natura:

La ordinara maĵora gamo de malsupre supren tonsilabiĝas (#Maĵora: Do Re Mi Fa So La Ti do) kaj la minora gamo (#Minore: La Ti do re mi fa so la).

La naturtona skalo kiun uzas popolmuziko havas interalie la sekvajn tonsilabojn, kie la tonsilaba frekvenco esprimiĝas rilataŭ la frekvenco de la baza tono (toniko):

<Natura: [Da]=24/25, [Do]=1, [Di]=25/24, [Ra]=27/25, [Re]=9/8, [Ri]=75/64, [Ma]=6/5, [Mi]=5/4, [Fa]=4/3, [Fe]=11/8, [Fi]=25/18, [Sa]=36/25, [So]=3/2, [Su]=14/9, [Si]=25/16, [La]=5/3, [Tu]=7/4, [Ta]=9/5, [Ti]=15/8, [do]=2>. En ekzemple a-maĵora la

frekvenco de la toniko estas 440 hercoj, do [Do] = 440 Hz, [So] = $3/2 \times 440 = 660$ Hz kaj tiel plu. Vortoj kiuj ne kantiĝas sed paroliĝas tonsilabiĝas per [vo].

& Tonciklo:

En ĉiuj tonskaloj kiuj baziĝas je oktavo laŭ Zoltan Kodály, interalie Natura kaj la egaltempera (logaritma) tonskalo de Werckmeister, la diferenco inter toncikloj estas duobligo de tonalto. Apostrofo antaŭ tonsilabo altigas la tonon per tri oktavo kaj komo malaltigas ĝin per tri: <[,do]=1/4, [DO]=1/2, [Do]=1, [do]=2, ['DO]=4>.

& Rimarko:

Rimarko staras en pinta parentezo < > kaj enhavas indikojn pri la peco.

& Frekvenco kaj takto:

Frekvenco por sekundo skribiĝas per dupunkto. Indiko <[La]=a>, kiu signifas a-minoron, ankaŭ skribebblas <[La]=440:>

